



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2006 numero 2-a: marto / majo



Fotis Stefano Keller la 22-an de marto.

Ekde la kreo de CDELI Andrée Gacond nelacigeble venadis po duonan tagon semajne por registri la alvenintajn periodaĵojn. Tio signifas, ke la festado de la 50-jara jubileo de CDELI ankaŭ estos la festado de 50 jaroj de helpa kunlaboro.

Se prezentiĝas registra problemo, kiel ni vidas sur la foto, tiam kun sia edzo ŝi serĉas konvenan solvon.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,
CDELI, Biblioteko de la Urbo,
CH-2303 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : claude.gacond@ne.ch

Tel. : ĉe CDELI : 032 967 68 55
hejme: 032 926 52 32

Redaktaj kunlaborantoj:

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz,
Stefano Keller, Andreas Künzli,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2006-3: junio-aŭgusto: maje 15, kun mencio de informoj ekde julio.

2006-4: septembro-oktobro: aŭg. 15, kun mencio de informoj ekde oktobro.

2006-4: novembro-decembro: okt. 15, kun mencio de informoj ekde decembro.

2007-1: januaro-februaro: dec. 15, kun mencio de informoj ekde februaro.

2007-2: marto-majo: februare 15, kun mencio de informoj ekde aprilo.

Konsultu la retejon de SES !

www.esperanto.to/ses

SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.
Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch

Dietrich Weidmann, vicprezidanto, PF
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.
Retpoŝto: info@esperanto.ch

Mireille Grosjean, vic-prezidanto,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :
032 932 18 88.

Retpoŝto : mireille-grosjean@rpn.ch

Nicole Margot, sekretario, Chemin des
Lys 4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14
67. Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.
Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	



Svisa kalendaro

Informo de la kasisto : Koran dankon al ĉiuj, kiuj kotizis por la jaro 2006. Kiu ne jam pagis, tiu bonvolu fari tion baldaŭ. Kotiztabulo troviĝas sur la apuda kovrilpaĝo. Hans-Werner Grossmann.

Aprile

- 1: Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 3 : Lausanne: LES : kun Claude Gacond.
- 4 : Genève, La Stelo : kun Dominique de Mestral.
- 5: Luzern : LES : ĉe ges-roj Rey.
- 5: Wil : EKW : Prelego de Stanislaw Pochanke.
- 27: Basel: ESB: Ludvespero.

Maje

- 1 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 2 : Genève : La Stelo : kun Laurent Burgbacher.
- 3: Luzern : LES : Konversacia rondo.
- 3: Wil : EKW : Kunveno.
- 6: Chaux-de-Fonds: Ĝenerala Kunveno de SES & 50-jara jubileo de CDELI.
- 6-7: La Sagne : Kultura Semajnfino.
- 13 : Rapperswil : Koncerto de Jan. S. Skorupski.
- 15: Redakta datlimo de *SES informas*.
- 18: Basel-Reinach: ESB: Invito ĉe B. Spalinger.
- 20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Junie

- 6 : Genève : La Stelo : UEA-rondiro kun Künzli.
- 7: Luzern: LES : ĉe ges-roj Rey.
- 7: Wil: EKW : Prelego de Bruno Graf.
- 22: Basel: ESB: Minigolfo.
- 23-25: Lausanne: LES: Ekskurso.

Julie

- 5: Luzern: LES : Konversacia rondo.
- 5: Wil: EKW: Promenado al la nova turo de Wil.
- 29 ĝis 6-a de aŭgusto: Florenco: 91-a U.K.

Aŭguste

- 10: Luzern: LES: Ekskurso.
- 13: Wil: EKW: Tuttaga ekskurso.
- 15: Redakta datlimo de *SES informas*.

27: Basel: ESB: Ekskurso.

Septembre

- 4 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 6: Luzern: LES: Konversacia rondo.
- 6: Wil: EKW: Kunveno.
- 27: Basel: ESB: Kunveno pri la ferioj.

Oktobre

- 2 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 4: Luzern: LES: ĉe ges-roj Rey.
- 7: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 15: Redakta datlimo de *SES informas*.
- 21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 28: Basel: ESB: Prelego de Hans-Peter Senn.

Novembre

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 6 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 8: Luzern: LES: Konversacia rondo.
- 8: Wil: EKW: Raporto pri la UK.
- 18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 23: Basel: ESB: Invito ĉe Hans-Peter Senn.

Decembre

- 2: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 6: Luzern: LES: ĉe ges-roj Rey.
- 6: Wil: EKW: Fondua vespero.
- 15: Redakta datlimo de *SES informas*.
- 17: Lausanne: LES: Zamenhofa Festo.

Januare 2007

- 3: Luzern : LES : Konversacia rondo.

Februare

- 15: Redakta datlimo de *SES informas*.

-oOo-

Vivo de SES

Ĝenerala Kunveno de SES kaj 50-jara jubileo de CDELI

La Chaux-de-Fonds, Biblioteko de la Urbo
Sabaton 6-an de majo 2006

Ĉiu rezervu la daton de la sabato 6-a de majo, dum kiu digne festiĝos la 50-jara jubileo de CDELI kaj la eldono de la enciklopedio *Universalaj lingvoj en Svislando* verkita de Andreas Künzli, kies kuneldonantoj estas Svisa Esperanto-Societo kaj CDELI kun la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

Horaro

9h00 : Malfermo de la CDELI-salono.

La bibliotekistino Martine Schneller respondos al la demandoj de la esperantistoj kaj vizitantoj de la modernigita biblioteko, ĉar paralele al nia esperanto-aranĝo okazos tago de la malfermitaj pordoj de la biblioteko por la publiko. Nancy Fontannaz servos la esperantistojn ĉe la akceptejo kaj aliaj kunlaborantoj de CDELI zorgos pri la libra kaj brokanta servoj, sensoifigos la alvenantojn, kaj gvidos la vizitojn al la libraro, arkivaro kaj koridora ekspozicieto de CDELI.

10h30 : En la aŭlo : Ĝenerala Jarkunveno de SES.

La tagordo kaj la raportoj aperas ĉi sube. Laŭstatute membroj rajtas fari proponojn al la estraro. Por esti diskutata dum la jarkunveno propono estu subskribita de tri membroj kaj atingu la prezidanton unu monaton antaŭ la asembleo.

12h00 : Saluta spektakleto de la gelernantoj de La Grande Ourse.

12h30 : En la CDELI-salono : Aperitivo.

13h00 : Iro al la tura restoracio Citérama por la tagmanĝo.

13h15 : Komuna tagmanĝo.

Menuoj vianda kaj vegetarana je po Fr 23.- Verda salato, meleagraĵo aŭ ovaĵo, gratenita terpomaĵo, fazeoloj, glaciaĵo.

14h30 : Reveno al la biblioteko.

15h00 : En la aŭlo :

Jubilea ceremonio festanta la kvindekjariĝon de CDELI.

Parolantoj : La direktoro de la biblioteko Jacques-André Humair, Claude Gacond, Andreas Künzli, Tomasz Chmielik kaj reprezentantoj de la aŭtoritatoj kaj de esperanto-organizaĵoj. Tradukaj deĵorantoj : Mireille Grosjean kaj Luc Allemand.

Muziko : Akompanata de la fama itala pianisto Giuseppe Giusta el Cuneo, Jean-

Thierry Von Büren kantos erojn de Vintra Vojaĝo de Schubert en la traduko de Mad Mevo/Stakian.

16h30 : Konkluda trinkado en la CDELI-salono.

17h30 : Fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo

Ĉiu partoprenonto bonvolu sin anonci al Claude Gacond kiel eble plej frue per unu el la sekvaj rimedoj :

Letere al Claude Gacond, CDELI, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds.

Rete al claudio.gacond@ne.ch.

Telefone al 032 967 68 55.

Ĉiu bonvolu klare indiki siajn nomon kaj adreson kaj la deziratan tagmanĝan menuon ĉu viandan, ĉu vegetaranan.

La sukceso mem de la ĉi supre menciita programo grandparte dependos de kiel eble plej frua alveno de la aliĝoj. Por la rezervo de la necesaj tabloj en la restoracio kaj la antaŭmendo de la menuoj ĉu vianda, ĉu vegetarana, por la pretigo de la listo de la partoprenantoj, por la mendo kaj instalado de la kunsidaj tabloj en la aŭlo, por la organizo de la aperitivo, ktp. nepre dezirindas, ke la aliĝoj alvenu kiel eble plej frue. Pri tio antaŭdankas Claude Gacond kaj ties kunlaborantoj.

Plilongigu vian restadon en esperantujo

Kial veturi al La Chaux-de-Fonds por nura sabata programo ? Tial ĉi sekve anonciĝas Kultura Semajnfino disvolviĝonta tuj poste en la vilaĝo La Sagne najbara al La Chaux-de-Fonds. Nepre profitu tiun ĉi okazon por plilongigi vian praktikadon de esperanto en certe tre agrabla etoso. Informoj pagoj

Tagordo de la jarkunveno

1. Komunikoj de la prezidanto.
2. Elekto de la voĉnombrantoj.
3. Protokolo de la lastjara kunveno, aperinta en *SES informas* 2005-3, ne laŭtlegota.
4. Jarraporto 2005, jarkalkulo, bilanco, raporto de la revizoroj.
5. Buĝeto 2006.
6. Modifo de la statuto.

La Estraro proponas adapti la artikolon 16-an al novaj cirkonstancoj, interalie ĉar du personoj (Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann) proponas sin por esti kunprezidantoj de SES. Ni celas al pli da flekseblo en la organizo.

Artikolo 16-a nuna:

„La Estraro estas la plenuma instanco de Svisa Esperanto-Societo. Ĝi konsistas el minimume kvin (maksimume sep) elektitoj fare de la Asembleo. Inter ili estas

prezidanto (kies voĉo estas decida en kazo de egaleco), vicprezidanto, sekretario kaj kasisto. La tri ĉefaj lingvoregionoj de Svislando devas esti reprezentitaj en la Estraro.“

Artikolo 16-a nova:

„La Estraro estas la plenuma instanco de Svisa Esperanto-Societo. Ĝi konsistas el minimume tri, maksimume sep elektitoj fare de la Asembleo. La Estraro organizas sin mem. La prezida funkcio povas esti plenumita de prezidanto, vicprezidanto aŭ de du kunprezidantoj laŭ reciproka interkonsento. La lingvoj kaj kulturoj ekzistantaj en Svislando estu laŭeble reprezentitaj.“

7. Repreno de la esperanto-ekzamenoj kaj retiro de la ekzamena regularo inter SES kaj KCE, ratifita 15.03.1997.

En 1997 la jarkunveno de SES ratifis regularon pri ekzamenoj kaj delegis tiun taskon al KCE. Nuntempe la Estraro deziras, ke okazu en Svislando ankaŭ internaciaj ekzamenoj de ILEI, ĉar ni estas landa asocio de UEA. Eblas ekzameniĝi dum UK aŭ laŭbezone enlande. Por tio necesas starigi ekzamenkomisionon, kiu konsistas el tri rajtigitaj ekzamenantoj, al kiuj apartenas ekzemple Mireille Grosjean, Claude Gacond kaj Monika Molnar. Interesatoj povos elekti inter ekzamenoj de ILEI kaj tiuj de KCE.

8. Elekto de la estraro kaj de la kaskontrolantoj.

Post 9 jaroj de prezidado Bruno Graf deziras pludoni tiun funkcion. Feliĉe kandidatoj ekzistas, tamen estas malfacile trovi kapablajn personojn por la estraro. Kun bedaŭro ni anoncas la retiriĝon de Nicole Margot, kiu plenumis diversajn funkciojn dum longa tempo.

9. Honorigo de membro.

Laŭ art. 7-a la estraro proponas elekti la internacie konatan kaj meritplenan Claude Piron kiel honoran membron de SES.

10. Diversaĵoj.

Jarraporto 2005

Komence de la jaro la estraro kunsidas por revidi kaj bilanci la agadon. Estas horo de la vero, ĉar vidiĝas la sukcesoj kaj malsukcesoj. Ofte oni ne estas kontenta pri la rezulto, ĉar la taskoj estas senlimaj. Respondeculoj konas tiun senton.

Ni fiksas **celojn** por 2005, sed ne povis plenumi ĉiujn. La perkoresponda kurso en la germana lingvo ne antaŭeniris. Same la svisa planlingva enciklopedio ne ankoraŭ eldoniĝis kaj prokrastiĝis. Montriĝas, ke niaj laborfortoj estas tre limigitaj. Tamen la plej multaj celoj pli malpli estas realigitaj.

La **estraro** funkciis, diskutis kaj decidis perrete. Tiel ni ŝparas tempon kaj monon. Momente ni havas du vicprezidantojn, alemanan kaj romandan. Mankas itallingva reprezentanto, sed itallingvaj taskoj maloftas. Bedaŭrinde en Tiĉino la nombro de la esperantistoj malkreskis.

La **membraro** restis stabila, kiel montras la statistiko de la kasisto. Tio jam estas pozitiva punkto vide al la troa maljuniĝo de la membraro. Ni nur nombras dekon da gejunuloj kaj JES ne sufiĉe aktivis manke de interesatoj. Ni atendas novan iniciaton de la junularo. Finjare SES havis 167 membrojn kaj 16 abonantojn de la bulteno. Inter ili estas 4 honoraj membroj, 7 dumvivaj, kaj 14 patronoj, kiuj pagas duoblan kotizon.

Ni donas prioritaton al la **informado**. Mireille Grosjean redaktis diversajn dokumentojn en la franca lingvo kaj sendis ilin al redakcioj kaj instancoj. La temoj traktas la lernadon, la propedeŭtikan valoron, esperanton sur la reto, la invadon de la angla kaj la eŭropan tagon de la lingvoj. Dietrich Weidmann dissendis 2 gazetarajn komunikojn, el kiuj rezultis radio-intervjuo. Li respondis al pli ol 100 demandoj retroŝtaj kaj subtenis per informoj kaj materialo 3 lernantojn, kiuj prezentis abiturlaboron pri esperanto. Laŭdezire ni aperigis varbanoncon en agendo de gimnazia klaso de Brig.

Nia bulteno **SES informas** aperis 5 foje danke al la laboremo de nia ŝatata redaktoro Claude Gacond. Li laboras honorofice kaj dediĉas multan tempon por komposti kaj dissendi la informilon. Kiel estro de CDELI li estas aparte kompetenta kaj organizas regule studsabatojn en la urba biblioteko. Kune kun kelkaj kunlaborantoj li sukcesas aperigi ne nur inform-, sed kulturriĉan bultenon. Ĝi informas ankaŭ pri la vivo de esperanto-centroj kaj lokaj grupoj, kvankam ili ne anas al SES.

La **jarkunveno** okazis la 16-an de aprilo 2005 en la esperantejo de la Esperanto-Societo Zürich. Estas agrabla kaj moderna kunvenejo, la laborejo de Dietrich Weidmann. La jarkunveno disvolviĝis glate. Du junaj viroj, Benno Frauchiger kaj Rolf Ernst, paroladis ege interese pri ĉina ŝakludo kaj Feng Ŝui. Estas bedaŭrinde, ke ne partoprenis pli da personoj. La protokolo pri la jarkunveno legeblas en *SES informas* n-ro 3-2005.

Nicole Margot organizis regionan tagon en Lausanne la 15-an de oktobro 2005. Matene Bruno Graf respondis al la aktuala demando, kiel prezenti esperanton dum la angla regas. Li intencis liveri realisman argumentaron kaj kuraĝigi la membrojn. La posttagmezo estis dediĉita al ekologiaj temoj fare de prelegoj de d-ro Manfred Westermayer kaj Alain Favre. Kelkaj interesatoj vizitis dimanĉe la urbeton Moudon.

Menciinda estas ankaŭ la prelegaro de André Cherpillod okazinta en CDELI la 6-an de novembro 2005. La temo „Hillel la saĝulo kaj la zamenhofa hilelismo“ estas filozofie esenca por esperantistoj. La sentencoj de Hillel, kiu strebis al toleremo inter religianoj, aktualas ankoraŭ hodiaŭ.

Tiu estas la naŭa kaj lasta raporto, kiun mi verkis kiel prezidanto, ĉar mi emas retiriĝi. Necesas novaj gvidantoj kun novaj ideoj. SES estas malgranda societo, sed ties misio estas granda. Mi esperas, ke ni daŭre trovos agemulojn por pluporti la torĉon.

Bruno Graf

Bilanco - Jarkalkulo - Buĝeto

N-ro	Konto	1.1.2005	31.12.2005
1010	Poŝtkonto	3'734.07	2'016.59
1011	Fiksa poŝtdepono	7'000.00	7'000.00
1030	WIR banko	34'985.70	36'334.10
1060	Prunto al KCE	15'000.00	15'000.00
1090	UEA konto sesa-v (Saldo: € 327.04 je kurzo 1.56)	318.88	510.18
1100	Inventaro	1.00	1.00
1150	Bonhavo ĉe ESTV: Antaŭimposto	375.70	237.78
1300	Transaj aktivoj	89.00	375.00
	Sumo aktivoj	61'504.35	61'474.65
2000	Transaj pasivoj	667.00	1'235.00
2100	Kapitalo	57'184.55	56'386.85
2400	AGADO 2003 (restanta rezervita kapitalo)	3'162.80	3'162.80
2410	AGADO 2005 (rezervita kapitalo, inklusive dum 2005 ricevitaj donacoj de 200.00)	490.00	690.00
	Sumo pasivoj	61'504.35	61'474.65

JARKALKULO		2005	Budĝeto 2005	Budĝeto 2006
3000	Informado, varbado	3'256.75	5'000.00	* 3'500.00
3001	Kontribuo al presado de la Svisa E-Enciklopedio			5'000.00
3010	Omaĝoj, laborrimedoj	188.00	200.00	200.00
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	2'843.00	1'000.00	2'000.00
3110	SES informas elspezoj	2'137.35	2'500.00	2'500.00
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (ĜK, estrara, regionaj)	435.35	700.00	700.00
3150	Abono al revuoj	139.00	100.00	150.00
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	205.70	300.00	300.00
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	751.00	500.00	800.00
3220	Bank- kaj poŝtspezoj	101.10	200.00	150.00
3230	Donaco al KCE	450.00	450.00	450.00
3240	Redaktado perkoresponda kurso germanlingva		2'500.00	0.00
3500	Diversaĵoj	0.00	300.00	300.00
	Sumo elspezoj	10'507.25	13'750.00	16'050.00
4200	Membrokotizoj	5'700.00	5'000.00	5'500.00
4210	Abono al SESi sen membreco	775.00	800.00	800.00
4300	Donacoj, heredajoj	2,070.20	3'000.00	2'500.00
4600	Bank kaj poŝtinterzoj	1'129.35	1'500.00	900.00
4800	Diversaĵoj	35.00	0.00	0.00
	Sumo enspezoj	9'709.55	10'300.00	9'700.00
	Plielspezoj	797.70	3'450.00	6'350.00

*) Redukto por 2006 pro la kontribuo al la presado de la Svisa Esperanto-Enciklopedio; por 2007 estos denove 5'000.00.

Raporto de la kaskontrolantoj por la jaro 2005

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Christiane Sixtus, kunvenis kun la kasisto Hans Grossmann la 15an de marto 2006 en Bern por kontroli la librotendon.

La saldoj de la jaro 2004 estas ĝuste transskribitaj, la kontrolitaj ciferoj kongruas kun la pruviloj, same la saldoj fine de 2005.

Ni konstatis, ke la konto "Agado 2003" montras saldon de 3'162.80 same kiel en 2004. Urĝas nun, ke tiu konto povu esti likvidata per la finkalkulo **ricevenda** de Claude Gacond.

En la buĝeto 2003 troviĝis investo de CHF 5'000 por redaktado de perkoresponda kurso germanlingve. Fakte elspeziĝis en 2003 CHF 2'500 por la enkomputiligo de la malnova kurso. Ni konstatis, ke tiu projekto stagnas kaj eĉ ke la estraro neniom buĝetis por ĝi por la jaro 2006. Espereble tiu projekto havos sekvon, se ne la CHF 2'500 estos perditaj.

Ni kore dankas nian kasiston Hans Grossmann pro la tre zorge farita librotendo. Ni proponas al la Ĝenerala Jarkunveno aprobi ĝin (kun plielspezoj de CHF 797.70), la bilancon 2005 kaj malŝarĝi la kasiston kaj la estraron.

Bern, la 22an de marto 2006.

La kaskontrolantoj Christiane Sixtus & Dieter Rooke.

Vizitkartoj kun esperanta simbolo

Ĉu vi deziras belajn vizitkartojn kun esperanta simbolo? Se jes, legu plu.

Klaso de artmetia lernejo ERACOM en Lausanne kreis esperantajn simbolojn laŭ iniciato de François Randin, kiu informis kaj instruis esperanton al la klasanoj, por ke ili ekkonu la spiriton de la lingvo. SES financis la projekton kaj kune kun Lauzana Esperanto-Societo prijuĝis la kreaĵojn kaj aljuĝis premiojn.



Junges esperanto schweiz
jeunesse espérantophone suisse
giovani esperantista svizera
gjuventutga esperantista svizro

La ĉi supra simbolo en verda koloro ricevis la unuan rangon. La diversgrandaj rondoj simbolas lingvojn grandajn kaj malgrandajn, kiuj unuiĝas harmonie en la malgranda e, emblemo de esperanto. La cirklo samtempe skizas la teron. La simbolo estas noveca kaj originala.

La direkto de la lernejo permesis la uzadon de tiu simbolo por la esperanta informado en senco komunutila. Christiane Sixtus unuafoje uzis la simbolon sur karteto varbanta por esperanto-kursoj en la popoluniversitato de Genevo. Ŝi ankaŭ

pretas presigi personajn vizitkartojn kun tiu emblemo. Interesataj membroj turnu sin tuj skribe al Christiane Sixtus, chemin des Mollex 15, 1258 Perly aŭ sixtus@freesurf.ch.

Bruno Graf

Donacoj ricevitaj en decembro 2005

Donacoj en frankoj al SES: Jacqueline Favre, Genève: 15; Nancy Fontannaz, Pully: 50; Chantal & François-Alain Perret-Gacond, Genève: 5; André Sandoz, La Chaux-de-Fonds: 100; Berthe Spalinger, Reinach/BL: 15; Nekredebla Verdkata Socio (NVS), St. Gallen: 30; Henri Wettstein, Versoix: 30. **Sume: 245.**

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann dankas al la registritaj donacintoj pro ties malavareco.

-oOo-

Kultura Semajnfino en la vilaĝo La Sagne Hotelo Von Bergen

Sabaton 6-an kaj dimanĉon 7-an de majo

Sabata programo

18h04 : Trajna forveturo de La Chaux-de-Fonds al La Sagne.

18h18 : Alveno en La Sagne.

Por la aŭtomobilantoj parkaj ebloj proksime de la hotelo.

18h30 : Akcepto de la partoprenantoj en la hotelo Von Bergen.

19h00 : **Komuna vespermanĝo.** Prezo : Fr 20.-

Velura supo poreca, miks-salato, bov-lango, terpoma kaĉo kaj sezonaj legomoj aŭ spagetoj kun artiŝokoj, fruktokuko.

20h30 : **Claude Gacond rakontas pri la vivo en La Sagne meze de la dudeka jarcento. Kun lumbildoj. Kanta konkludo kun Marie-Louise Münger, kiu lernis esperanton en la lernejo de La Sagne.**

22h30: Bonan nokton!

Litaj ebloj: La Hotelo Von Bergen kutimas gastigi migrantojn en ĉambroj simplaj, kelkaj plurlitaj.

3 ĉambroj kun 1 geedza franceca lito: po Fr 69.- individue aŭ geedze.

2 ĉambroj 2-litaj. Po Fr 49.- por persono.

2 ĉambroj kun geedza franceca lito + 3 litoj. Po Fr 39.- por persono.

1 ĉambro kvarlita. Po Fr 39.- por persono.

Rezervo de la litoj laŭ la vica alveno de la aliĝoj.

Eblos ankaŭ tranokti en hoteloj de La Chaux-de-Fonds.

22h59 : Trajna forveturo de La Sagne al La Chaux-de-Fonds

23h13 : Alveno en La Chaux-de-Fonds.

Dimanĉa programo

08h00 : Matenmanĝo. Prezo Fr 9.-

08h04 : Trajna forveturo de La Chaux-de-Fonds al La Sagne.

08h18 : Alveno en La Sagne

09h00 : Pripensiga momento kun Marie-Louise Mürger

10h00 : Paŭzo.

10h15 : Edmond Privat en Pollando : Prelego de Tomasz Chmielik kun prezento de retrobildoj.

11h00 : Kafumo.

11h15 : Ree en Pollando kun Edmond Privat kaj Tomasz Chmielik.

12h00 : Babilado aŭ promenadeto en la vilaĝo.

12h45 : Komuna tagmanĝo. Prezo : Fr 25.-

Celeria supo, miks-salato, porka rostaĵo kun karotoj kaj terpomoj aŭ « rösti » kun fandfromaĝo, glaciaĵo.

14h00 : Organizo de aŭtomobila veturo al Tête de Ran por admiri la paŝtejojn kovritajn de florantaj jonkviloj.

16h30 : Konkludo de la semajnfino en la stacidomo de La Chaux-de-Fonds.

Aliĝo

Ĉiu partoprenonto bonvolu sin anonci al Claude Gacond kiel eble plej frue per unu el la sekvaj rimedoj :

Letere al Claude Gacond, CDELI, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds.

Rete al claude.gacond@ne.ch.

Telefone al 032 967 68 55.

Pro la eblo partopreni entute aŭ nur parte la aranĝon, ĉiu bonvolu klare indiki al kio li partoprenos: Ĉu vespermanĝo vianda aŭ vegetarana, ĉu tranokto (dezirata litkategorio), ĉu matenmanĝo, ĉu tagmanĝo vianda aŭ vegetarana, ĉu kuna migrado al la jonkviloj. Ankaŭ utilas la mencio : mi veturos trajne aŭ aŭtomobile.

La pagoj okazos surloke kaj estos petita partoprenkotizo de Fr 15.- por la kovrado de la organizaj kostoj (senkosta por infanoj, lernantoj kaj studentoj).

-oOo-

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, Biblioteko de la Urbo,
Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. Tel. : 032 967 68 55.

Retadresoj: martine.schneller@ne.ch, claud.gacond@ne.ch,
nancy.fontannaz@ne.ch, monika.molnar@ne.ch.

Atentu pri la venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Rezervu la sekvajn sabatojn : **maje 20, oktobre 21, novembre 18.**

Kultura sabata seminario okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **aprile 1, oktobre 7, novembre 4, decembre 2.** La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos rekompencitaj per ricevo de atestilo.

Venontaj studtemoj : La unua-libro de 1887, ties planlingva argumentado, prilingva enhavo kaj originalaj beletraj tekstoj. Komparo inter la lingvo de 1887 kaj la hodiaŭa. Decidigaj influoj de la unua revuo *La Esperantisto*, de Louis de Beaufront, de Kabe.

Horaro de ambaŭ aranĝoj

10 h 00: Malfermo de la CDELI-salono kun eblo aĉeti librojn kaj babili kafumante.

10 h 45: **Oficiala malfermo**, formiĝo de la stud-rondoj.

11 h 00: **1-a studperiodo.**

11 h 45: paŭzo.

12 h 00: **2-a studperiodo.**

12 h 45: Paŭzo por komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14 h 15: **3-a stud-periodo.**

15 h 00: teuma paŭzo.

15 h 15: **4-a stud-periodo.**

16 h 00: **Konkluda kunveno.**

16 h 15: Teumo, librovendo.

17 h 00: **Oficiala fermo.**

Aliĝo

Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj ĉiu bonvolu nepre antaŭ-anonci sian partoprenon al Claude Gacond almenaŭ ĝis la tago antaŭ la koncerna aranĝo je la 16h00 ĉu skribe : Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claude.gacond@ne.ch

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55 (hejme 032 926 52 32).

Partoprenkotizo: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario. (Lerneĵano, studento, metilernanto kaj JES-ano senpage). Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon ĝis 17h00 la antaŭan tagon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

-oOo-

KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311, 2301 La Chaux-de-Fonds

Tel. & Fakso : 032 926 74 07, kce.esperanto@bluewin.ch

Raportoj kaj programo aperas en la ĵurnalo *Heroldo de Esperanto*

-oOo-

Svisa ILEI-sekcio

Prezidanto : Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets.

SIS ne havas propran aktivecon. La bonegaj kursoj donataj ĉe CDELI en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds okazadas sub la aŭspicioj de SIS. Kunlaboras en la instruado Nancy Fontannaz, Claude Gacond, Stefano Keller kaj Monika Molnar. La kursoj okazas la trian sabaton de la monato. Okazas ankaŭ kultursabatoj kun prelegoj komence de la monato.

La prezidantino Mireille Grosjean.

-oOo-



Loka vivo

Averto : Por la **junia-aŭgusta numero 2006-3** de *SES informas*, kiu dissendiĝos fine de majo la redakta datlimo estas je la 15-a de majo. Informantoj pri la loka vivo bonvolu tuj havigi siajn raportojn ĝis tiu dato al Claude Gacond, Poŝtfako 3034, CDELI, Biblioteko de la Urbo, 2303 La Chaux-de-Fonds. Retpoŝto : claude.gacond@ne.ch.

Basel

Esperanto-Societo Basel, PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12.
Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Kunvenoj

Aprile 27: Ludvespero.

Maje 6: Ĝenerala kunveno de SES kaj 50-jara jubileo de CDELI en La Chaux-de-Fonds.

18 : Invito ĉe Berthe Spalinger en Reinach je la 19h00.

Junie 22 : Minigolfo en la Grün '80, 19h00 apud la restoracio.

Aŭguste 27 : Ekskurso.

Septembre 28 : Ni rakontas pri la ferioj.

Oktobre 28 : Hans-Peter Senn prelegos pri « Agave-regiono » en Portugalio.

Novembre 23 : Invito ĉe Hans-Peter Senn. Programo 2007.

Decembre : Zamenhofa festo.

-oOo-

Bern

Esperanto-Societo Bern: Prezidanto : Daniel Ruchti, Moos, 3763 Därstetten. Tel.: 079.312.41.44 kaj Landgarbenstr. 18, 3052 Zollikofen. Sekretario: Ueli Haenni, Praktischer Arzt, Kreuzmatte, Kreuzstr. 2, 3052 Zollikofen. Tel.: 031 911 23 22 kaj Linckweg 2, 3052 Zollikofen. Tel.: 031.911.64.72.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20. Esperanto-infos : Tel. : 022 740 04 45.
Monata kunveno la unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) en la
stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salle des conférences 2, je la 20 h 00.

Kunvenoj

Aprile 4 : kun Dominique de Mestral el la laŭzana grupo.

Maje 2: kun Laurent Burgbacher el la laŭzana grupo.

Junie 6: Rondiĝo laŭ la UEA-lokoj en Genève kun Andreas Künzli. Rendevuo ĉe la
stacidomo Cornavin je la 18h15 kaj ekpomenado je la 18h30. Poste organiziĝos
manĝeto en kunvenejo.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 246, 1000 Lausanne 22. Tel: 021 657 14 56

esperanto@isuisse.com <<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20 h 00.

Kunvenoj

Aprile 3 : Kun Claude Gacond : ekzercoj pri la rolo de la sufiksoj ig kaj iĝ.

Maje 1 : Kunveno.

Junie 23-25 : Ekskurso.

Septembre 4 : Kunveno.

Oktobre 2 : Kunveno.

Novembre 06 : Kunveno.

Decembre 17 : Zamenhofa Festo.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke. Tel.: 041 280 46 12.

**Kunvenejoj: Hotelo Waldstätterhof: Zentralstr 4 (proksime de la stacidomo).
Tel. 041 227 12 71. Restoracio Emmenbaum: Gerliswilstr. 8, 6020 Emmen-
brücke. Ĉe Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.**

Venontaj kunvenoj

Aprile 5: ĉe ges-roj Rey: 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30 : La fascina vivo de la abeloj kun Annelies Dettling.

Maje 3: Konversacia rondo kun Paul Scherer en Waldstätterhof 14h00-16h00.

Junie 7: ĉe ges-roj Rey: 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30.

Homaranismo kun Sonja Brun.

Julie 5 : Konversacia rondo kun Sonja Brun en Waldstätterhof 14h00-16h00.

Aŭguste 10: Ekskurso: Vespera programo kun Koni Rey.

Septembre 6: Konversacia rondo kun Paul Scherer en Waldstätterhof 14h00-16h00.

OktoBRE 4: ĉe ges-roj Rey: 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30. Vorto-Mozaiko kun Koni Rey.

Novembre 8: Konversacia rondo kun Sonja Brun en Waldstätterhof 14h00-16h00.

Decembre 6: ĉe ges-roj Rey: 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30.

Zamenhofologio kaj programo 2007.

2007 Januare 3: Konversacia rondo kun Paul Scherer en Waldstätterhof 14h00-16h00.

-oOo-

Kantono de Neuchâtel

Neŭŝatela grup-vespero

Pro la riparoj en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, kiu malebligis normalan aliron al la CDELI-salono ni devis beaŭrinde nuligi niajn vesperajn kunvenojn. Tuj kiam la CDELI-salono estos normale enirebla vespere, tiam ni diskonigos tion al la esperantistaro de la kantono Neuchâtel per kunvoko al inaŭgura festeto, dum kiu ni planados la venontan programon.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil. www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder

Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel.: 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch

Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel.: (P) 071.390.04.48 (O)

071.390.04.44. Fax: 071.390.04.47

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (apud la suda elirejo de la fervoja stacidomo).

Kunvenoj

Aprile 5 : Impresoj de la 17-a Lingva Festivalo en Ukrainio per lumbildoj kun Stanislaw kaj lingva ekzercado kun Olivia.

Maje 3 : Provelecio kun Olivia kaj Verena kaj reteja prezentado kun Wolfram.

Junie 7 : Prelego de Bruno Graf kaj lingva ekzercado kun Olivia.

Julie 5 : Promeno al nova turo de Wil kun Barbara, kunportu rostaĵojn.

Aŭguste 13 (dimanĉo) : Tuttaga ekskurso kun Verena kaj Liliane.

Septembre 6 : Kunveno.

Novembre 8 : Raporto pri la UK en Florenco kun Roberto kaj lingva ekzercado kun Wolfram.

Decembre 6 : Fonduo kun la familio Fischer kaj poemoj, rakontoj kaj kantoj.

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld. Tel.: 044 251 50 25

info@esperanto.ch. reto: www.esperanto.ch/zurich

Regula merkreda programo, krom dum la ferioj

18.00–18.45 : kurso por komencantoj.

19.00–19.45 : konversacia rondo.

(por la merkredaj kursoj bonvolu aliĝi ĝis la tago antaŭa sub telefono 044 251 50 25 dum la oficejhoraro aŭ retpoŝte sub info@esperanto.ch).

-oOo-

« Donitaj paroloj » : Libro-interŝanĝo iniciita de tri eklezioj


De la 13a ĝis la 15a de januaro 2006 la tri eklezioj de la neŭŝatela kantono (reformita, katolika-romana kaj katolika-kristana) organizis libro-interŝanĝon, laŭ la fenomeno *Bookcrossing* : La paroĥanoj estis invititaj, forlasi en publikaj lokoj (kafejo, stacidomo, ...) librojn, kiuj plaĉis al ili. Poste eble iu prenos ĝin, legos kaj relasos aliloke. Kompreneble la enhavo devis rilati kun pli-malpli kristana temo.

Unu semajnon antaŭe la legintoj alportas la librojn al respondecul(in)o en ĉiu komunumo. Post rapida ekzameno de la enhavo oni gluis glumarkon klarigante la agadon. La titolo kaj la aŭtoro estis notitaj, por eble retrovi la devenon de la libro. Je la menciitaj datoj ĉiu iris al elektita loko, por lasi la libron. En Le Locle estis en kafejo. Trinkinte kafon, ni foriris, lasinte la libron surtable.

Speciala retpaĝo estas de la 10-a de januaro malfermita (www.parolesdonnees.ch). Tiel ĉiu povas lasi komenton aŭ reagon pri la agadon aŭ pri libro(j), kiu(j)n iu trovis. Laŭ statistikoj inter 700 kaj 1000 libroj estis dislasitaj en la kantono.

Per tiu ideo la eklezioj volas montri, ke ili aktivigas en la societo, ili estas proksimaj de la loĝantaro. Anstataŭ grandegaj afiŝoj por pagi impostojn, ĉi-jare la tri komunumoj elektis modernan kaj senpagan disdonon. Kompreneble, kiel en ĉiu grupo, kelkaj reagis negative, sed la plej junaj akceptis afable tiun amuzan ludon.

La libro-interŝanĝo estas internacia kaj pli kaj pli konata : ĉiu povas ludi ! Ekzemple vi legis libron, kiu vere plaĉis al vi. Vi decidis lasi ĝin en stacidomo, vagono, sur benko aŭ en restoracio. Nenio pli ! Vi povas ankaŭ registri vin en la retpaĝo www.bookcrossing.com. Tiel vi eble vidos, kie via libro estis trovita. Meze nur 20% de la registritaj libroj ricevas reagon. Certe kelkaj mortas en rubujo ; sed tio estas ankaŭ la ludo. Mi rigardis la retpaĝon "bookcrossing" kaj mi rimarkis, ke en la mondo « vojaĝas » libroj pri kaj en Esperanto. Estas do nova metodo, por alvenigi novajn personojn al la lingvo.



Mi do rekomendas al vi : se vi trovas libron, ne forĵetu ĝin, sed legu kaj lasu ĝin en publika loko por alia nova vojaĝo !

Jean-Marc Leresche

teknoŝofio

pri interreto, tekniko, socio kaj la sekvoj.
kunmetita por vi de rolfo@esperanto

Internacia Televido lanĉuta

Ambicia projekto: la unua televidkanalo en esperanto: **internacia.tv**, mallonge ITV, ricevebla nure per la reto. La unuaj filmetoj por testi la sistemon nun pretas. Rimarkojn sendu al admin@internacia.tv. Bonŝancon al la unua reta televidejo en Esperantio! Espereble ĝi vivegos.

La grandema Ĝangalo

Vere profesia retejo en la internacia lingvo estas **gxangalo.com**. La optika kvalito tre altas. Oni tuj vidas, ke iuj dediĉas multe da tempo al tiu projekto. Sed tia profesieco ne estas senpaga. Por aliri ĉiujn servojn oni devas kotizi malmodestajn € 35 por 6 monatoj.

Kio estas MAS?

Monda Asembleo Socia (MAS) estas tutmonda organizo de ĉiuj homoj, kiuj ne nur konvinkigis ke pli bona mondo eblas, sed kiuj pretas kune diskuti kaj agi por realigi ĝin. Ili agas por la monda paco, defendas la interesojn de la tuta homaro kaj klopodas por evoluigi – komencante ĉe si mem – eksternacian pens- kaj agmanieron home solidaran. Pli je **mas-eo.org**.

Mortis la radio. Renaskiĝis la radio!

La esperantistoj bone scias pri la malaperado de mallongondaj radioprogramoj en esperanto (ekz. Svisa Radio Internacia en la 90aj jaroj). Sed ne plu necesas priploradi ekde nun. Jes, vi legas ĝuste:

Ĉar radio nove inventiĝis – dank'al la interreto kaj ties teknikaj eblecoj. La nova maniero aŭskulti radion estas tempe sendependa kaj sonkvalite multe pli alta ol la tiamaj kaj ankoraŭaj mallongondaj elsendoj. **Podkasto** nomiĝas la plej nova maniero ĝui radi(ec)ajn elsendojn. Oni abonas al certaj stacioj, kaj aŭtomate, tuj

kiam pretas nova elsenda epizodo, via komputilo ricevas la sondokumenton. Plej bone tio eblas per la softvaro iTunes de Apple (senpage ĉe apple.com/itunes). Ne nepras tiu komforta ebleco, ankaŭ eblas aŭskulti epizodojn vizitante la koncernan podkastan retejon.

La vorto **podkasto** estas kombinaĵo el *iPod* ([aipod], la fama portebla muzikludilo, esperante: *podo*) kaj *brodkasto* (disaŭdigo). La praideo estis, ke oni aŭskultas la elsendojn survoje per sia iPod aŭ alia MP3-ludilo. Tamen, ne necesas havi tian ileton (nek troviĝi survoje). Simple sufiĉas komputilo kiel ricevilo-aŭdigilo.

La unuaj podkastoj en esperanto estas tiuj ĉi:

– **Radio Verda** (radioverda.com): Arono kaj Karlina el Kanado aldonas epizodon ĉirkaŭ trifoje semajne.

– **esPodkasto** (esperanto.to/podkasto): Rolfo el Esperantio babilas semajne pri ĝojo kaj frenezigo.

– **Esperanto-Radio-Arkivo** (radioarkivo.org): ĝi kolektas kaj havebligas diversajn elsendojn en kaj pri esperanto jam aperintaj aliloke.

Podkastoj estas senpagaj. Kaj ĉiu persono estas libera publikigi sian propran podkast-elsendon per la reto. Ne plu estas privilegio de iuj ŝtatoj decidi pri sendi aŭ ne sendi en iu lingvo aŭ ne, respektive pri enhavoj – podkastado estas baze demokratia – kaj tial furoregas! Radio finfine sendependiĝas (kompreneble ankaŭ geografie).

Podkastado estas vera revolucio – kresdu min! Ekzistas jam milegoj da programoj en multaj lingvoj kaj pri plej diversaj fakaj temoj. La komerca radio, kiu ludas la samajn 50 (konatajn) kantojn ĉiun tagon, estas mortonta! (Kaj pro tio vi apenaŭ aŭdas ion pri podkastado en tiaj radioj – ili timegas podkastadon.)

Biblioteko Pola
POLA MUZEO
EN LA KASTELO RAPPERSWIL

sabaton, la **13**an de majo 2006 je la 16'00-a

en la ekspozicia salono
de Pola Muzeo en la kastelo Rapperswil

Jan Stanisław Skorupski

poezia koncerto

NAVIGARE NECESSE EST

poemoj kaj kanzonoj skribitaj sub veloj
kantataj pole kaj en Esperanto

germane legataj de

Helmut Vogel

kun piana akompano de

Witold Czajkowski

« La batalo kontraŭ la malsato perdiĝas pro la milito kontraŭ la terorismo »

Tio estas la konkludo de la speciala raportisto de UN pri la rajto je nutraĵo, la sviso Jean Ziegler, en sia ĉi-jara raporto prezentita en la ĉefsidejo de UN en Novjorko.*

• *Laŭ swissinfo*

Malgraŭ la celo duonigi la nombron de la malsatantoj en la mondo ĝis la jaro 2015, tiu nombro kreskis en la lasta jaro je 10 milionoj por atingi 820 milionojn. Laŭ Ziegler tio estas la sekvo de falsaj prioritatoj de UN kaj Usono. Dum la vendado de armiloj daŭre kreskas kaj preterpasis en la lasta jaro la limon de 1000 miliardoj da dolaroj, la internacia komunumo ne sukcesas disponigi sufiĉe da rimedoj por lukti kontraŭ la malsato en la

mondo. La buĝeto de la Monda programo por nutraĵoj – kiu ebligis la postvivon de 91 milionoj da homoj en la lasta jaro – estis reduktita je 30 procentoj.

* Jean Ziegler (71-jara), emerita profesoro pri sociologio kaj ekonomio en la ĝeneva universitato kaj la Sorbono en Parizo. Socialdemokrata deputito en la svisa parlamento (1967-1983, 1987-1999). Konata pro siaj atakoj kontraŭ la svisa banka sekreto. De la jaro 2000 speciala raportisto de UN pri la rajto je nutraĵoj. La esperanta portalo Ĝangalo prezentis intervjuon kun Jean Ziegler, maldekstra politikisto kaj renoma sociologo, pri lia lasta verko «La imperio de la hontindego», en kiu li forte kritikis tutmondiĝon. Ni represas ĝin kun la permeso de la redakcio kaj de la tradukinto.

Intervjuo kun Jean Ziegler

Ĝangalo : Oni rigardas vin kiel unu el la plej akra-langaj kritikistoj de la « tutmondigita rabobesta kapitalismo ». Vi atakis bankojn kaj la grandajn konzernojn kaj engaĝis vin por la malsatuloj. Ĉu oni metis ĉi tion en vian lulilon?

Jean Ziegler : Ne, tute ne. Mia engaĝiĝo estas la sekvo de bazaj travivaĵoj en Afriko. Tuj post la murdigo de Patrico Lumumba (Patrice Lu-

mumba), mi laboris certan tempon kiel oficisto de UN por Kongolo kaj travivis tie ĝis tiam por mi ne-imageblan mizeron kaj subigon. La institucio UN havis sian sidejon en la hotelo Royal. Sub la fenestroj ripetigis ĉiuvespere je krepusko la sama spektaklo. Longaj vicoj de malsatantaj infanoj el la antaŭurboj de Kinŝaso moviĝis rekte al la barikadoj, kiujn gardis armitaj soldatoj.

La nigraj infanoj ne rajtis enpaŝi en la blankulan enklavon; eĉ la almozpetado estis malpermesita al ili. Post la latbarilo jen la armitaj soldatoj. Unu el ili levis de tempo al tempo sian maŝinpafilon al la ĉielo. Salvo krake eksonis, sed la malsatigitaj infanoj moviĝis plu. Ĉe la barilo la plej multaj el ili renversiĝis. Aliaj ĵetis sin per lasta fortostreĉo kontraŭ la dorndrata barilo kaj firmkroĉiĝis al ĝi, kaj aliaj falis kun malfermitaj brakoj sur la straton. Ĝis mia vivofino mi ne forgesos la aspekton de iliaj okuloj.

Ĉu la infanoj mortis sub la okuloj de ĉiuj?

Jes, kiel fajna pluvo, softa muziko fluis laŭ la blankaj fasadoj de la hotelkonstruaĵo malsupren, sub la lustro en la interno iu ambasadoro akceptis iun negociston el iu eŭropa lando. Tiu levis sian ĉampanglason kaj laŭdis per troige solenaj vortoj la civilizigan mision de la Okcidento en Kongolo. Kun nazo premita al la fenestro mi vidis la infanojn morti. La neskueblaj armitaj soldatoj, kiuj staris kun la dorso al la konstruaĵo, limigis sin je tio: tiam kaj tiam per kolbo de fusilo draŝi sur la kapetojn, kiuj kun kvazaŭ superhoma streĉiĝo de tempo al tempo aperis super la barikadoj. Aliaj soldatoj, kiuj estis ekipitaj nur per ponardo, liberigis la mortantajn infanojn el la dorndratoj, en kiu ili estis firmkroĉiĝintaj, per tio, ke ili deigis iliajn fingrojn per tranĉilpinto. Poste ili ĵetis la senvivajn korpojn sur la straton. En tiu momento mi ĵuris al mi neniam denove – ankaŭ ne hazarde – esti sur la flanko de la ekzekutistoj.

Kiel juna viro vi volis iri al Kubo, ĉu?

Estis nokto en aprilo 1964. Jaron antaŭe mi estis rondvojaĝinta kun la grupo Clarté en Kubo. Mi volis reveni tien, por vivi tie. La kuba delegacio, gvidata de Ĉe-Gevaro (Che Guevara), pro la unua sukerkonferenco en Ĝenevo, enloĝiĝis en la hotelo Intercontinental, en la komunumo Petit-Saconnex. Dek-du kubanoj kune loĝis en tri ĉambroj en la sepa etaĝo. Mi petis al ili donacon. Ni diskutis la tutan nokton. En la oriento, super la Mont Blanc ekmateniĝis jam. Sube vekigi la urbo. Ĉirkaŭ la lagogolfo, trempita en laktecan lumon iom post iom estingiĝis la koloraj neonpaneloj de la bankoj kaj asekuraj kompanioj kaj famaj juvelistoj. En sia olivverda uniformjako, la magra Ĉe-Gevaro staris ĉe la fenestro. Li vokis min kaj diris per sia ĉiam iom rauka voĉo: « Ĉu vi vidas tiun urbon?... Ĉi tie vi estas en la cerbo de la monstro! Kion plian vi volas? Via batalkampoj estas ĉi tie. » Lia kruda kaj definitiva rifuzo de mia deziro elmigri ofendis min. Mi estis konvinkita, ke la argentinano dubas pri mia revolucia engaĝiĝo aŭ pri miaj kapabloj. Sed Ĉe-Gevaro kompreneble pravis.

En via libro « La imperio de la hontindego » vi priskribas tiun monstron kiel « novan klason de feŭdaj regantoj, la kosmokratojn de la grandaj konzernoj ».

Tiuj novaj feŭdistoj havas pli da potenco ol iam posedis imperiestro, reĝo aŭ papo. En la jaro 2004 la kvincent plej grandaj konzernoj kon-

trolis 22 % el la monda produktado. Ilia sola agomaksimo estas la maksimumigo de profitoj. Ilia profit-avido estas senlima. Ilia ekonomia milito inter si kaj kontraŭ la popoloj estas permanenta. Ili evoluigis mondvastan sistemon de la struktureca perforto. Cent kvardek jarojn antaŭ la naskiĝo de Kristo, la romia batalestro Kornelio Scipio Emiliano komplete detruis kaj ebenigis Kartagon kaj murdigis multajn el ĝiaj 700 000 loĝantoj. Sed post lia reveno al Romo, li denove estis submetita al la *ius gentium*, al la jura sistemo, kiu regulis la rilatojn de Romo al aliaj popoloj. Sed nun regas la ekstrema perforto permanente. Ne temas plu pri preterpasanta « malheligo de la prudento », kiel Max Horkheimer komprenis ĝin.

Kial vi elektis kiel elirpunkton de via kritiko la Francan Revolucion ?

Kun la kolapso de la ŝtatsocialismo kaj la rifuzo de la marksismo ligita al tiu, ekestis granda spirita vakuo – ankaŭ ĉe la maldekstrularo. Granda parto de la eŭropa kolektiva konscio estis supersŭtita. La libro volas montri la efektivan horizonton de la historio, la grandan « Epokon de la Klerismo », kiu postulis la homajn rajtojn, el kiuj multaj plu atendas sian efektivigon – la rajto pri vivo, pri libero, pri indo, sed ne laste ankaŭ la rajto je strebado al feliĉo, kiu estis fiksita en la preamblo de la Sendependeca Klarigo de Usono. En la 18-a jarcento tio estis pura utopio, sed nun la homaro disponas ankaŭ pri la materiaj rimedoj efektivi tiujn rajtojn. Sed samtempe malsato kaj mizero ampleksiĝis pli terure ol en ĉiu alia epoko de la

homaro. Kvankam la Franca Revolucio estis la decida mortopuŝo por la feŭda sistemo, nun komenciĝis refeŭdismigo de la mondo : la transnaciaj konzernoj etendas sian potencon trans la tutan planedon Tero.

Vi ĉiam mencias la francajn revoluciuojn Babeuf, Saint-Just kaj Jacques Roux kiel ĉefatestantojn kontraŭ la novaj regantoj de la mondo.

La Franca Revolucio havis jam propran maldekstran opozicion – fontojn, kiujn mi denove liberigis. Saint-Just deklaris, ke civilaj kaj politikaj homrajtoj taŭgas al nenio sen socialaj kaj ekonomiaj homrajtoj. Roux vokis al la Konvencio: « La libero estas vanta cerbofantomo, se unu klaso senpunate povas malsatigi aliajn. » Tio validas nun pli ol iam. En Argentino, Brazilo kaj en aliaj landoj de Sudameriko estas demokratio, sed la malsato kreskas. Tio ne signifas, ke demokratio kaj politikaj homrajtoj estas malĝustaj, sed ke ili estas tute nesufiĉaj. Tial la batalo por ekonomiaj, socialaj kaj kulturaj rajtoj estas nerezignebla.

Kion vi esperas ĉe tio pri la Unuigintaj Nacioj?

UN dum jardekoj leĝigis multajn gravajn konvenciojn, speciale ankaŭ pri homrajtoj. Se oni rigardas la tekstojn, oni vidas, ke la rajto pri humaneco senĉese evoluas. Sed en la realeco pli kaj pli da baroj en la internacia rajto estas ŝiritaj teren. La plej juna ekzemplo : La nova usona ambasadoro Johano Bolton (John Bolton) volas adaptigi la konvencion

pri torturoj al la novaj praktikoj de Usono kontraŭ la teroro. La torturoj estu denove difinataj. Nur la restanta kripligo de prizonulo restu malpermesita. UN mem estas nun ege malfortigita. La novaj feŭdistoj dependas nek de la ŝtatoj nek de UN. La Monda Organizo pri Komercio, la Monda Banko kaj la Internacia Mona Fonduso sufiĉas al ili kiel servopretaj solduloj de siaj strategioj. En tiu ĉi jaro Unuiĝintaj Nacioj festis sian sesdekan fondotagon, sed bone eblas, ke ili ne longe transvivos ĝin.

Kial vi tamen transprenis la oficon de precipa raportisto de UN pri la rajto je nutraĵoj?

Certe, la influebloj en tiu ĉi ofico estas etaj. Sed mi vidis ankaŭ la bonŝancon uzi la ekonomiajn kaj socialajn rajtojn kvazaŭ armilo kontraŭ la imperion. Ĉiukaze mi povas krei per miaj UN-raportoj – la kvinan mi prezentos je la dudeksepa de oktobro 2005 en Novjorko – transparenton pri la sekvoj de la regado de la novaj feŭdaj mastroj. La nombro de la homoj, kiuj suferas pro malsato kreskas en ĉiu jaro. Ĉu ĵus en Niĝerio, ĉu en Mongolio aŭ en la okupitaj palestinaj teritorioj. Ĉie mi travivis la ĉiutagan masakron per malsato. Cent mil homoj mortas ĉiutage pro malsato aŭ ĝiaj senperaj sekvoj – plej ofte en la cent kaj dudek-du landoj de la Tria Mondo, en kiuj vivas 4,8 (kvar komo ok) miliardoj de homoj. Malsato fariĝis amas-neniigilo. Kaj tamen konstatas la sama raporto pri la monda nutrado, kiu prezentas tiujn viktimaĵajn nombrojn, ke la monda agrarekonomio en sia nuna evoluŝtupo povus

nutradi sen problemoj dek-du miliardojn da homoj, la duoblon de la aktuala mondoĝantaro – ĉe po 2700 kalorioj ĉiutage. Ne ekzistas fataleco. Infano, kiu mortis pro malsato estas murdita. La mondordo de la tutmondigita rabobestkapitalismo ne nur murdas, ĝi estas ankaŭ absurda. Ĝi mortigas, sed ĝi mortigas sen bezono.

Ĉu vi pensas, ke la jarmila celo – duonigo de la parto de la monda loĝantaro, kiu suferas pro ekstremaj malriĉo kaj malsato – estos atingita ĝis la jaro 2015 ?

Ne, malriĉo kaj malsato pli kaj pli kreskas anstataŭ tio, ke ili malpliigas. Rigardu la homamasigon en la hispana enklavo Meliĝo. Ĉu en Niĝerio, Malio, Senegalio aŭ Maŭritanio – multaj familioj aŭ vilaĝoj ne plu vidas alian elirvojon el la mizero krom sendi sian junajn virojn al Eŭropo. Ili kolektas monon por ili, kun la espero, ke tiuj povas trapasi la longan vojon tra la Saharo kaj povas grimpi trans la domdratajn baraĵojn.

Kion la Eŭropa Unio devus fari por la solvado de la rifuĝinto-krizo?

En 2004 pagis la industriŝtatoj al siaj kamparanoj 394 miliardojn de dolaroj por la produktado kaj la eksporto... preskaŭ po duona miliardo da dolaroj ĉiutage ! Sur la foirplaco de la senegala ĉefurbo Dakaro oni povas aĉeti eŭropajn fruktojn kaj legomojn por triono de la prezo de la indiĝenaj fruktoj kaj legomoj. La eŭropa dumpingopolitiko dezertigas la afrikajn agrarekonomiojn. EU devus forigi siajn gigantajn agrarsubvenciojn, kaj

malaltigi la importbarojn por varoj kaj produktoj el afrikaj landoj kaj nuligi la ŝuldojn de la evolulandoj. La homoj devas trovi en siaj landoj enspezon homindan – sed ne per almozoj. Dum la industriaj landoj en la jaro 2003 helpis al la Tria Mondo per ŝtataj evoluelspezoj kun amplekso de kvindek kvar dolarmiliardoj, la samaj landoj devis transĝiri kvarcent tridek ses miliardojn dolarajn por ŝuldoj. Do, ne tiom gravas doni pli da mono al la homoj de la Tria Mondo, sed pli gravas malpli ŝteli de ili.

Kiel UN-komisiito vi sufiĉe ofte havis debatojn kun tiuj novaj feŭdaj mastroj...

Ili ĉiuj gloras la samajn ilojn : oni devu privatigi. Ili timemas abundon kaj disponeblon de varoj, ĉar tio influas la maksimuman profiton. Ili nun volas regi ankaŭ pri la naturo, antaŭ ĉio pri la akvofontoj, kaj pri vivo – ili volas patentigi la genetikajn ecojn de plantoj kaj de bestoj nur por ilia utilo.

La kosmokratoj mem ne havas tru-pojn. Sed ili posedas – tiel vi skribas – fakte armitan brakon : la usonan ŝtad-administradon.

La rab-atako al Irako, en marto 2003, montras tion tute evidente. Ni rigardu por momento la personaron : Condolezza Rice estis, antaŭ ol ŝi avancis en Vaŝingtono, direktorino de Chevron, Buŝ (Bush) elgajnis sian posedon en la naftoindustrio. Rumsfeld estis ĉe Texaco kaj Ĉenej (Cheney) ĉe Haliburton. La milito en Irako estas la rekta plenumo de la konzern-

strategio de la naftokompanioj. La rezulto estas preskaŭ dumil mortaj usonaj soldatoj kaj cent sesdek mil civiluloj kaj soldatoj el Irako, kiuj mortis de la komenco ĝis julio de tiu ĉi jaro en la milito aŭ pro ĝiaj sekvoj. Sed Irako havas ja la duan rangon en la mondo, se temas pri la nafto-rezervoj : cent dek-du miliardoj da barelplenoj.

La brazila prezidanto Lula aperas en via libro kiel granda lumfiguro.

Lula estas por mi granda espero. En Brazilo ekis demokrata, kontraŭkapitalista revolucio, kiu grandskale decidis pri la estonteco de la kontraŭkapitalisma popolmovado en la tuta mondo. Kun la programo « Fome Zero ! » (malsato nula), Lula volas forigi la malsaton. Kvardek-kvar milionoj el la 182 milionoj da brazilanoj estas permanente kaj grave maltruntrataj. Sed Lula antaŭ ĉio heredis de la militdiktaturo eksterlandan ŝuldon, kiu havas amplekson de 244 miliardoj da usonaj dolaroj. La pagado de la ŝuldoj malhelpas la batalon kontraŭ la malsato. En la Partio Laborista jam leviĝis indigno. Lula troviĝas en tute malbona kaj komplika situacio, li bezonas nian solidarecon.

Kun granda simpatio vi citas Babeuf pri la necesa detronigo de ĉiuj malnovaj barbaraj institucioj – ĉu utopio?

Ne, se la viktimoj de la barbara tutmondiĝo fariĝas aktivaj formantoj de sia sorto. Kun mia libro mi volas helpi ekigi tiun procedon, kiu povus kunflui en ribelon de alianciĝintaj

aŭtonomaj fortoj de planeda civil-socio, kiu skize jam aperas. Mia libro volas esti armilo en tiu ĉi batalo. En mia oficejo en Ĝenevo pendas foto. Ĝi montras Bertolt Breĥt (Bertolt Brecht) sidanta sur parkbenko en Berlino, kun libro en la mano. Sub tio estas skribita : « Bertolt Breĥt – armita ».

Intervjuo originale farita en la germana lingvo kaj publikigita en la gazeto Neues Deutschland, 15a de oktobro 2005, p. 3. Tradukis Cezar Kaiser (Hans-Georg Kaiser), kun la aprobo de la administracio de la gazeto : <http://gxangalo.com/modules-intervjuo/ziegler.php>. Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Ĝangalo, oktobro 2005.

Nove aperis

Antropozofia Kristologio. Elektitaj tekstoj. Elektro, traduko kaj eldono de Willy Nüesch, Berno 2005, 320 p.

Kiel teologo kaj emerita pastro de la Komunumo de Kristanoj antropozofii-nspira, la tradukinto-eldoninto elektis el prelegoj de Rudolf Steiner tekstojn rilate kristologion. Li ĉerpis ĉefe el la cikloj de paroladoj pri la kvar evangelioj kaj la Apokalipso, sed ankaŭ el « De Jesuo al Kristo », « Kristo kaj la homa animo », ktp.

Ĉi tiu dika volumo estas la dek-tria el la serio de tradukoj el la verkoj de Rudolf Steiner en esperanton fare de Willy Nüesch. Pri kristologio oni povas trovi du aliajn titolojn : « Kiel mi trovas la Kriston ? » kaj « La kvina evangelio ».

Por informoj aŭ libromendoj :
Willy Nüesch, Brückfeldstrasse 11,
CH-3012 Berno, tel. 031 302 66 56.

—ooOoo—

La roma fontano

*Radi' leviĝas, falas en
La basenrondon el marmor',
Post vualig' la akvo jen
En duan rondon fluas for ;
La dua donas, post ekplen',
Al tria siajn ondojn plu,
Samtempa don', samtempa pren',
Ripoz' kaj flu'.*

La kanto de la maro

*Nuboj, idoj, migri ĉu sen brido
Volas vi ? Bonfartu ! Ĝis revido !
Mi ne povas teni en patrinaj
Ligoj vin, figuroj migrinklinaj.*

*Vi de miaj ondoj forspiras,
Ĉar la tero tie vin altiras :
Bordoj, klifoj, fajro de l' lumturo !
Ek, infanoj, for al aventuro !*

*Velŝipantoj, en l' aero krozu !
Kulmojn serĉu !
Super saŭk' ripozu !
Kaŭzu luktojn, fulmojn kaj
tempestojn !
Portu ardbatalajn purpurvestojn !*

*Muĝu en la pluvo, en la fontoj !
Fluu al la putoj, al la ondoj !
En riveroj vin tra landoj trenu –
Venu, ho infanoj, ho revenu !*

El Conrad Ferdinand Meyer, Elektitaj
poemoj, trad. Willy Nüesch, Berno 2005.

Momento kun Luiza Carol



Luiza Carol estas verkisto de Israelo, kiu publikigis en la angla kaj rumana kaj revas verki librojn en esperanto baldaŭ. Nun ŝi estas lernanto, bonega lernanto !

• *Richard Schneller*
(*Perreta intervjuo en novembro 2005*)

« SES informas » : Luiza Carol, vi ferias en Zermatt. Kial vi elektis ĉi tiun lokon por feriado ?

Luiza Carol : Mia edzo kaj mi amas Svislandon kaj ferias en la Alpa montaro tre ofte. La unuan fojon ni vizitis Svislandon en 1982 kaj ekde tiam ni revizitis ĝin pli ol dudek fojojn. Kelkfoje ni restis tie nur kelkajn horojn aŭ tagojn, pasante ; kelkfoje ni restis tie unu monaton aŭ eĉ ses semajnojn. Ni amas Svislandon pro la pureco de la montara aero kaj ŝajnas al ni ke eĉ la animoj de la homoj estas pli puraj tie ol en aliaj lokoj. Ni amas tie la zorgon de la homoj por ne damaĝi la belegan naturan ĉirkaŭaĵon kaj ne damaĝi la belegan socian ĉirkaŭaĵon. Kiam mi revas pri la estonteco de la homaro, mi ŝatas imagi la tutan mondon kiel unu belan kon-

federacion, same kiel Svislando. Sed nuntempe, tio estas nur revoo...

Ĉi-jare la neĝo frue alvenis en Zermatt kaj la malvarma vetero ne invitas al promenoj, ĉu ne ?

Mi tre amas la neĝon, precipe en la montaro. Kiam neĝas, ŝajnas al mi ke la ĉielo lavas la mondon en pura blankeco. En Zermatt ne blovis, la neĝo falis vertikale, malrapide, per grandaj flokoj kiel reve. Post du tagoj la neĝo malaperis en la urbeto, sed ĝi restis sur la montopintoj brilante. Demetinte la blankajn paltojn, la arboj surmetis siajn aŭtunkolorajn vestojn, la plej diversajn. La lastajn du semajnojn de oktobro, ni loĝis en apartamento ĉe la bordo de la arbaro; tra la fenestro de la banejo mi povis vidi grandan abion, kelkfoje vizitata de sciuro. Dum la tuta monato oktobro, estis multaj serenaj vesperoj kiam la steloj ŝajnis tiom grandaj kaj tiom proksimaj ke mi sentiĝis same kiel astronauto en kosmoŝipo.

Vi vivas en Israelo sed naskiĝis en Rumanio, profesie instruas la anglan kaj pianludon. Ĉu en via ĉiutaga vivo vi uzas la hebrean, la rumanan aŭ la anglan ? Kiujn lingvojn oni ĝenerale plej ofte uzas en Israelo ?

La oficialaj lingvoj de Israelo estas hebrea kaj araba. Tiuj estas la plej uzataj lingvoj de la lando. Sed en Israelo oni parolas ankaŭ multe da aliaj lingvoj, ĉar tie vivas multaj enmigrintoj. En mia ĉiutaga vivo mi uzas ĉiujn lingvojn kiujn mi konas pli-

malpli, kaj mi uzas ankaŭ pli multe da lingvoj se mi scipovus pliajn. Kun mia edzo kaj filino kaj kun amikoj de Rumanio, mi uzas la rumanan. Kun mia bofilo kaj liaj gepatroj, mi uzas la hebrean. Kun amikoj verkistoj en la angla, mi uzas la anglan. Tre malofte, mi uzas la francan kun amikoj el franclingvaj landoj. Mi uzas hebrean en vendejoj, stacidomoj, poŝtejoj, malsanulejoj, ktp. Mi uzas ĉiujn tiujn lingvojn plus Esperanton kiam mi ricevas kaj sendas leterojn per interreto. Lastatempe, mi ekuzis ankaŭ Esperanton por paroli kun esperantistaj amikoj. Kun la nepineto, kiu estas du kaj duono jaraĝa, oni decidis en la familia kunsido ke mi devas paroli la hebrean. Mi esperas ke tio helpos al mi plibonigi mian hebrean. La vero: la rumana estas la sola lingvo kiun mi scias bone. Ĝi estas mia naskiĝlingvo kaj neniam mi povis lerni alian lingvon same bone kiel ĝi.

Ĉu viaj lernantoj de la angla renkontas malfacilaĵojn kaj, se jes, kiujn ?

Ili renkontas la samajn malfacilaĵojn kiujn mi renkontis kaj renkontas lernante iujn ajn naciajn lingvojn. Oni lernas regulojn, post tiam oni lernas la esceptojn de la reguloj, la esceptojn de la esceptoj de la reguloj... Finfine la lernanto demandas: « Kial ? » kaj la instruisto levas la ŝultrojn respondante: « Mi ne scias kial. Tiel oni parolas. »

Se mi bone komprenas vi uzas specialan metodon por lingvoinstruado pere de rolludado. Ĉu vi povus doni kelkajn indikojn pri tio ?

Ĉiuj lingvo-instruistoj pli-malpli uzas dialogojn. Mi ŝatas ludi kun infanoj, uzante pupojn kaj maskojn. Tio iel maltedigas la lernadon.

Kiaspecan libron vi ŝatus verki, ĉu poezian ĉu prozan kaj pri kiu temo ?

Ĝis nun, mi verkis ĉiujn specojn de literaturo krom romano. (Fakte, foje mi verkis ankaŭ romanon, sed mi ne estis kontenta pri ĝi kaj ne eldonis ĝin. Eble mi reskribos ĝin iam.) Precipe mi ŝatas verki por infanoj kaj por junuloj. Lastatempe, mi verkis teatraĵojn por junuloj. Ili rilatas al maturiĝado kaj al mem-integrigo en la socion.

Vi serĉis kontaktojn kun svisaj esperantistoj. Ĉu vi sukcesis havi tiajn kontaktojn ?

Jes. La svisaj esperantistoj kiujn mi kontaktis estis ege afablaj kaj pacience helpis min paroli. Ĉi-jare, por la unua fojo, mi ne sentiĝis fremda en Svislando, danke al la varma « rondo familia ».

—ooOoo—

Vizitindaj retpaĝoj

– Fine de novembro la Eŭropa Komisiono – unu el la ĉefaj decidorganoj de EU – publikigis unuafoje oficialan komunikon pri multlingveco kaj lingva diverseco sub la titolo « Nova strategia kadro por multlingveco » : <http://www.liberafolio.org/Agado/eumultlingveco>

– CDELI informas pri la evoluo de internaciaj planlingvoj kaj la progresoj de la interncia lingva komunikado : <http://www.plansprachen.ch>